**RAPORTO PRI LA AGADO DE EEU EN 2009**

La kotizpagado ĉi-jare okazis kontentige. Mankis nur kelkaj pagoj.
La jaro estis komenco de la kriza periodo. Niaj esperoj ke EU plufinancos nin ĉu el la rimedoj dediĉitaj al funkciado de tuteŭropaj asocioj (por kio ni ricevis subvencion en 2008), ĉu por iu el de ni planataj gravaj konferencoj (kiel ni ricevis en 2007), sed bedaŭrinde malgraŭ maksimumaj klopodoj ĉiuj niaj projektoj estis malakceptitaj. Ni esperis ricevi subtenon ekde 2010. Maja kaj mi ellaboris tri grandegajn projektojn: unu por regula financado por tri sekvaj jaroj kie ni planis treege seriozan laborprogramon por la jaroj 2010-11 kaj 12 kaj du projektojn pri agadoj unujaraj (komuna kunlaboro de 15 landaj asocioj prezentantaj la plej bonajn praktikojn de kelkaj el ili  kaj projekto organizi konferencon de EEU dum la kongreso germanfranca en Kaiserslautern pri eŭropaj valoroj kaj simboloj). Maja ankaŭ finfaris ampleksan raporton pri la agado en 2008 por Eŭropa Komisiono, Aktiva Civitaneco kadre de la kontrakto pri financado. Flory faris kune kun Maja la financan raporton. La raporto estis pozitive taksita de EU kaj tial ni ricevis la duan parton de la subvencio por la jaro 2008. Krome ni ellaboris  projekton  organizi eŭropan konferencon en Hamburgo pri la temo »Kia estus Eŭropo nuntempe, se EU neniam estus fondita?« por la jaro 2011. Peton por tiu konferenco ni transdonos al la fondaĵo Aktiva Civitaneco en februaro 2010 kaj ni ankoraŭ esperas sukcesi pri tio. Tiusence okazis intensa kunlaboro kun la Hamburga E-societo, kiu decidis subteni la ideon kaj disponigi 5000 eŭrojn por la preparlaboroj. Ni unue diskutis pri tio en Herzberg kaj poste subskribis kontrakton pri tio. La projekto estis pli detale preparita por esti prezentota al la prezidanto de Eŭropa Parlemanto, Jerzy Buzek kun la peto ke li iĝu aŭspicianto. Sekve ni havis malbonan financan jaron en kiu ni ricevis nur la kotizojn de la Landaj Asocioj, malgrandan kontribuon de kotizoj de la kongreso en Herzberg kaj nesignifajn donacojn de kelkaj unuopaj esperantistoj escepte de Myoŝi Etsuo, kiu ankaŭ ĉi-jare donacis 1000 eŭrojn. Ni estas ankaŭ seniluziigitas pri preteco de Eŭropaj esperantistoj helpi finance la agadon de EEU. Ni aperigis alvokon por helpi nian laboron kaj profesian subtenon, sed al tio reagis neniu. Ŝajnas ke esperantistoj ne ŝatas subteni seriozan laboron en kiu nia asocio prezentiĝas neamatore en la diversaj  organoj kaj organizoj de EU.  Malgraŭ tio ni sukcesis reteni en tre minimuma formo la profesian laboron de Maja Tišljar (kiu pretis fari sian laboron kontraŭ minimume permesitaj pagoj per kiuj eblas formale esti registrita kiel salajrata persono en Germanio. Tio gravis, ĉar la kondiĉo por ricevi konstantan financadon estas ke la asocio jam havas almenaŭ unu profesiulon. Bedaŭrinde tio apenaŭ estas ebla en la sekva jaro. Etaj esperoj ekzistas, se ni sukcesos konvinki aliajn fondaĵojn en Germanio subteni la konferencon en Hamburgo kaj individuajn espeantistojn helpi per kontribuoj. Pro la financa situacio ni devis rezigni pri la propra buroo ekde julio 2009.

Malgraŭ tio ni atingis ege gravan sukceson dank al la profesia laboro kaj daŭra dujara partopreno de niaj reprezentantoj en diversaj internaj komisionoj de EU por aktiva civitaneco (vidu aldonitan raporton de Maja Tišljar).
Eŭropa Komisiono planas plibonigi la lingvan situacion en la senco de sia politiko pri multlingvismo kaj tial ĝi starigis eŭropan platformon por multlingvismo kiu prezentos la ĉefan konsultan korpon de la Komisiono pri la multlingvismo en nova strukturo de la Komisiono, kiu ne plu havas komisionanon por multlingvismo. Estas nia granda sukceso ke inter tridek eŭropnivelaj asocioj inter kiuj estas ege grandaj kaj influaj asocioj kiel Asocio de eŭropaj televidoj, Eŭropa asocio de institucioj edukantaj plenkreskulojn ktp troviĝas ankaŭ EEU, akceptita de Eŭropa Komisiono.
Ni ege esperas ke nia membraro komprenos tion kaj helpos niajn reprezentantojn en la Platformo Seán Ó Riain kaj Maja Tišljar aktivante en esploroj kaj kontaktadoj kiujn ili de tempo al tempo petos de nia membraro. Montrante nian seriozan kapablon kunlabori en tiu senco konstrue, ni povos altigi nian pozicion kaj foje denove ricevi subvenciojn.

Krome ni realigis ĉiujn plej gravajn punktojn de nia laborplano por 2009 kio inkluzivas:

- Prizorgado de la retpaĝaro pri kio zorgis Peter Balaž kvankam iom malpli, ĉar la paĝaro devas esti urĝe komplete renovigita. Ni planis tion fari en 2009 sed pro monmanko tio ne eblis.
- Redaktorino Vesna Obradović prizorgis regule la elektronikan version de Eŭropa Bulteno, kiu legeblas ĉe nia retpaĝaro www.europo.eu kaj ĉe www.gazetejo.org. Ĉi-jare aperis 8 numeroj (kvar duoblaj). Okaze de apero de ĉiu numero ni informis pri tio aron da internaciaj kaj naciaj retlistoj.
- Ni serioze ekpreparis la Hamburgan konferencon kaj agas je ĝia serioza starto. Margareta Handzlik aranĝis kunvenon kun la prezidanto de EP Jerzy Buzek kiu okazos komence de 2010 kaj kiun oni petos por esti aŭspicianto. Ni kolektas adresarojn kaj proponojn por prelegantoj en la konferenco.
- Ni distribuis helpe de Margareta Handzlik al EU-parlamentanoj (732 personoj) en septembro leteron kun la demando pri lingva stato en EU informante ilin pri raporto Grin kaj pensigante ilin pri la troa angligo de EU. Ni kunlaboris kun Etsuo Miyoshi pri plia aperigo de granda anonco en le Monde okaze de la Eŭropa Lingva Tago, kiu aperis du-foje.
- Ljudmila Novak, deputitino de Slovenio en EP stimulita de EEU prezentis proponon pri Esperanto en la Komisiono por Kulturo de la Eŭropa Parlamento kaj organizis elektronikan subtenon al ĝi. Subtenis ĝin pli ol 5000 homoj kun multcento da pozitivaj reagoj. Tamen en la Komisiono oni forĵetis la proponon sen lasi diskuti pri ĝi.

Granda eŭropa organizaĵo de neregistaraj organizoj antaŭ la novaj balotoj por Eŭropa Parlemento en junio prezentis la eblon elektronike proponi temojn kiujn la novaj parlamentanoj devus konsideri en sia laboro. Inter amaso da temoj en ĉiu el la landaj paĝaroj en kiuj eblis proponi kaj voĉdoni (krom en 5) estis ankaŭ propono pripensi la uzon de Esperanto en EU. Interese ke en pli ol duono de eŭropuniaj ŝtatoj unuan lokon sub edukado havis proponoj pri Esperanto. Tamen, fie, la organizantoj poste nenie menciis tion. (Analizo de tiu voĉdonado troveblas en Eŭropa Bulteno).
EEU-estraro partoprenis en la konsultadoj pri la strategio de EU por la jardeko 2010-2020 al kiu invitis prezidanto de Eŭropa Komisiono Baroso. La estraro akceptis deklaron kaj proponojn kiujn eblas legi en la EB kaj kiuj estis inter la 1500 proponoj de diversaj institucioj kaj individuoj transdonitaj al la Eŭropa Komisiono.

En la jaro la plej grava evento estis okazigo de la 8-a kongreso de EEU en Herzberg am Harz en Germanio, en Esperanto-Urbo. Ĝi okazis de la 28-a de majo ĝis la 2-a de junio 2009. Ĝi estis organizita kiel komuna kongreso de EEU kaj de GEA. Organizis ĝin Germana E-Asocio kaj Internacia centro Herzberg. Partoprenis entute 400 personoj el dudektri landoj. Dum la kongreso ni okazigis unu fermitan kaj unu malferman kunvenon de la Asembleo de EEU en kiu ni fintraktis la raportojn por 2008 kaj akceptis planojn por 2009 kaj decidis ke la sekva EEU kongreso okazos en Galway en Irlando en 2011 aŭ 2012. La asembleo ankaŭ akceptis starigi Komisionon por vigligo de la laboro kaj kunlaboro de landaj Asocioj kiun fine oni konstituis en decembro post kiam ĉiuj proponitoj akceptis esti membroj kaj taskigitoj. En la laboro de la asembleo partoprenis delegitoj el 15 membrolandoj. Dum la kongreso EEU organizis ankaŭ konferencon pri Esperanto kaj la Muro al Oriena Eŭropo, dediĉita al 20 jaroj de la Falo de la Berlina Muro. Kadre de la konferenco okazis du prelegoj: de Sean O Riain kaj de Georgo Silfer.
Zlatko Tišljar prelegis pri Strategio por Esperanto en EU kaj Peter Baláž pri Vikipedio kune kun Yves Nevelsteen. La prezidanto transdonis solene la diplomon kaj medalon por honora membreco de EEU en la jaro 2009 al la urbestro de Herzberg Gerhard Walter.
Ankaŭ la estraro havis du kunsidojn dum la kongreso kaj okazis aparta kunveno inter la estraro de EEU kaj la estraro de Hamburga E-Societo en kiu nia estraro proponis al Hamburganoj organizi en 2011 konferencon pri la temo "Kia estus la nuna Europo se EU neniam estus fondita" en Hamburgo.

Bedaŭrinde, ĉi-jare la plano partopreni en Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando), ne realiĝis pro kelkaj kaŭzoj sed la ĉefa estis manko de financoj.

Okaze de eŭropa lingva tago la 26-an de septembro la estraro invitis landajn asociojn festi ĝin per prelegoj kaj publikaj aranĝoj atentigante pri la UNESCO-jaro de Zamenhof. Tiusence plej elstaris la pagita anonco en le Monde de Etsuo Myjoshi kaj la distribuo de leteroj al Eŭropaj parlamentanoj en iliaj naciaj lingvoj.
En tiu tago Zlatko Tišljar prezentis trafan prelegon pri Eŭropa identeco kun prezento de filmo "Eŭropo 2050" kun subtitoloj en la germana al sciencistoj pri sociologio dum eŭropa simpozio organizita de Univeritato Klagenfurt (Aŭstrio) pri Estonto de EU. Kelkaj landaj asocioj eluzis la okazon organizinte prelegojn kaj ekspoziciojn dediĉitajn al Zamenhof.

Dum la UK en Bjalistoko la prezidanto de EEU Seán Ó Riain prelegis pri la agado de EEU kaj decidoj de la kongreso en Herzberg kaj estis organizita deĵorado dum la Kongresa Foiro en kiu la kongresanoj povis informiĝi pri la agado de EEU kaj pri la sekva kongreso en Galway.

EEU sukcese kunlaboris kun UEA kaj subtenis agadon de AVE kaj EDE  raporatnte pri ilia agado en la Eŭropa Bulteno. Aparte menciindas la granda laboro de EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) kiu partoprenis en Eŭropaj balotoj en Francio kaj Germanio. Ili ricevis malmultan procenton sed tamen estis rimarkitaj de milionoj da voĉdonantoj en tiuj du landoj kaj ricevis tridekmil voĉojn. Tio havis gravan propagandan efikon por Esperanto en EU.
Kun UEA estis regulaj kontaktoj: okazis interŝanĝo de informoj (en Esperanto-revuo kaj nia Bulteno), aktiva kunlaboro pri la Jaro de Zamenhof, partopreno en UK, Malferma tago de UEA dediĉita al Ivo Lapenna kaj en lanĉo de solena Memorlibro dediĉita al Humphrey Tonkin.

Niaj reprezentantoj partoprenis en pluraj aranĝoj de landaj asocioj:
Z.Tišljar partoprenis en Jarkunveno de Dana E-Asocio la 24-25. aprilo kie li dufoje prelegis pri Zamenhof, en la Simpozio dediĉita al Istvan Szerdahely en Budapeŝto la 30-an de aŭgusto, en Verkista Renkontiĝo en Hraščina en Kroatio en oktobro.
Seán Ó Riain partoprenis en Eŭropa Lingva Tago dediĉita al Zamenhod la 25-an de septembro en Kopenhago kie li prelegis pri Zamenhof en pola ambasadejo, en Galway (Irlando) kie li kunsidis kun estonta LKK de la 9-a kongreso de EEU ktp.
Petro Balaž partoprenis dum Zamenhof-vespero en Bratislava, Slovakio, kaj havis intervjuon por la ŝtata tutlanda radio »Rádio Slovensko 1«. Li partoprenis en malferma tago de UEA en Rorterdamo kaj preparkunveno por renkontiĝo kun J. Buzek (Seán, Margareta, Jozef) en Bruselo.
Bengt Nordlof partoprenis en Sveda E-kongreso.
Flory Witdoeckt partoprenis ĉefe en fakaj kunsidoj en Bruselo: 20.01.2009 "EESC - European Economic and Social Committee (Eŭropa Ekonomia kaj Sociala Komitato), 09.02.2009 "Enquete sur la Situation socio-economique des AISBL", Enketo pri la socio-ekonomika stato de la IASPC, 26.03.2009 "Hunger as a political challenge" (Malsato kiel politika defio), 25.06.2009 "VAT update" (Ĝisdatigo de Imposto je aldonita valoro), 17.09.2009 "Les contrats fournisseurs des associations", (Kontraktoj de liverantoj al asocioj), 15.10.2009 "The new Diretives VAT" (Novaj direktivoj pri AVI), 29.10.2009 "Obligations comptables des ASBL, AISBL et Fondations" (Kontistaj devigoj de ASPC, IASPC kaj Fondaĵoj), 25.11.2009 "Hosting Strategy and Development. BITC" (Gastigado-strategio kaj Disvolvado BITC), 22.12.2009 "Trade associations and European Competition Law" (Komercaj Asocioj kaj konkurencaj Leĝoj).Al tiuj aldoniĝas multaj kunvenoj ĉe la "Alta Konsilio" en WTC en Bruselo. Ĉiam temis pri Eŭropaj Direktivoj laŭ kiuj oni devas adapti la belgajn leĝojn. La kunvenoj okazis en 2009: 30.01 - 26.03 - 25.05 - 04.06 - 25.06 - 27.08 - 22.09 - 22.10 - 19.11.
Georgo Handzlik reprezentis EEU en jenaj aranĝoj: UK en Bjalistoko; Ĉeĥa Esperanto Konferenco en Svitavy; GRUPE - Gliwice, Pollando; Arkones, Poznan, Pollando; Zamenhof-

Tago, Pola Ambasado en Brazilio, Brazilo; Jarfina Kunfratiĝa Tagmanĝo de Taguatinga Esperanto-Klubo, Taguatinga, Brazilo; JES, Zakopane, Pollando.

La estraranoj partoprenis en aro da konferencoj kaj aranĝoj neesperantistaj kiuj rilatis al lingvaj demandoj.
Zlatko Tišljar partoprenis en la scienca simpozio de Klagenfurta universitato pri Estonto de Eŭropo la 26-an de septembro kaj enkadre de eŭropa projekto "Senioroj agantaj" en marto en Los Palatios en Hispanio kie li reklamis E-on kaj havis kurseton por la interesitaj partoprenantoj.
Seán Ó Riain partoprenis en pluraj konferencoj de EU kadre de EACEA kaj Multlingvisma Platformo kune kun Maja Tišljar (vidu apartan raporton) kaj en la konferenco pri tutviva lernado en Bruselo.
Hokan Lundberg partoprenis en registara konferenco en Svedio pri jura lingvo en diskuto kun Orban pri multlingvismo kie li starigis kelkajn demandojn en oktobro.
Maja Tišljar partoprenis en aro da aranĝoj, pri kio vidu apartan raporton aldone.

Menciindas plie aparte grava nova fenomeno en Eŭropo kiun EEU stimulas, sed en kiu ĝi ne rekte partoprenas: ĉiam pli da Esperantaj institucioj ricevas monon de eŭropaj fondaĵoj por internaciaj kunlaboraj projektoj kadre de Grundtvig, COmenius Culture kaj Aktiva Civitaneco fondaĵoj. En 2009 realiĝadis projektoj
de lerneja kunlaboro a) inter lernejoj en Britujo, Hungario kaj Germanio, b) inter Portugalio, Italio kaj Bulgario, c) inter Bulgario, Hungario ktp.
de kunlaboro por edukado de plenkreskuloj (Esperanto 55+) inter Pollando, Germanio kaj Slovakio,
de kunlaboro kultura pri interŝanĝo de infanliteraturo retradukita per Esperanto inter Hindujo, Kroatio, Slovenio kaj Italio
kaj projekto de E@I pri instruado de la slovaka per E-formulo.
Multaj informoj pri E-agado aperis en neesperantistaj medioj kaj ni ne kolektis precizajn indikojn sed sendube la plej gravaj ĉi-jare estis la kelkminuta BBC-informo pri la propedeŭtika eksperimento en Britujo kaj la aperigo de E-flago la 15-an de decembro en komenca paĝaro de Googlo  apud jam menciitaj anoncoj en Le Monde.

Zlatko Tišljar